



ELNA-BULTENO

ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 10(71)

Septembro 1971

DU UTILAJ SUGESTOJ EL LA USONA UNIVERSALA KONGRES-URBO

I. Ĉar ELNA-anoj havos pli da intereso en la aferoj en Portlando dum la venonta UK-jaro (1972), oni eble dezirus ricevi "Espilo," la Portlanda bulteno. La abono (\$1.00) estas havebla por ĉiuj: Dorothy Jones, P.O. Box 786, Portland, Oregon 97207.

II. Pro la neceso de kolektado por la Kongresa Fonduso, eble aliaj kluboj faros aranĝojn por helpi: ekzemple, anstataŭ la kutima Zamenhof-manĝefesto, oni povas observi "UK-Fondusa Kolektanta Monato," dum kiu estos t.n. Blankaj Elefant-Vendadoj, ktp. Espilo tiam publikigos la rezultojn.

MALPLIVALORIĜO DE LA DOLARO POSTULOS ŜANĜOJN

UEA informis al S-ro A. Doneis mezseptembre, ke: I. UEA decidis plialtigi la membro- kaj abonkotizojn en usonaj kaj kanadaj dolaroj por 1972 je 10%. Bedaŭrinde, tamen, la Jarlibro 1971/II, ekspedita la 2an de septembro, enhavas la malnovan kotizojn; II. Ĉiu nova abonanto por 1972, kiu abonas nun pere de S-ro Doneis, ricevos senpage "Heroldo" ekde la momento de la mendo ĝis la fino de la kuranta jaro 1971, kaj, por la novaj abonantoj la abontarifo 1972 restos same kiel tiu de la nuna jaro, malgraŭ tio, ke por la aliaj abonantoj la prezo kreskos de c. 10% (por Usono, \$5.00).

KIAL NE ESTAS RADIO-KURSO PRI ESPERANTO EN VIA URBO?

Ĉiu povas helpi kaj en la varbado, kaj en la instruado de nia lingvo, per radio-kurso (sonbenda), facile havebla je nur \$13.00, preta por la stacio en via urbo. Skribu al S-ino Robert L. Wills, 94 West Riverglen Dr., Worthington, Ohio 43085, aŭ rekte al WOSU Radio, 2400 Clentangy River Road, Columbus, Ohio 43210. (WOSU ne uzos ĝin por si mem dum 1971, ĉar S-ino Wills, pro laboro, ne havas la tempon por korekti "hejmtaskojn," sed ĝi restas disponebla ĉe WOSU.)

KOLEKTO DE USONA FOLKLORO

Cathy Schulze interesiĝis en tradukoj de usona folkloro, por libro, okaze de la 57a UK en Portlando en 1972. Ella Gibson afable montris al ni la kielon, per "Rip Van Winkle" (en ĉi tiu numero); alia Esperantisto nun tradukas "The Great Stone Face;" kaj ni esperas, ke iu tradukos "Paul Bunyan," ktp. Bonvolu sendi ilin (por la proponata libro) al la Informcentro Okcidenta, 410 Darrell Rd., Hillsborough, Ca. 94010.

MEZUSONA SAMIDEANO AGEMA LABORIS EN INTERNACIA KORESPONDADO

S-ro Paul J. Lareau (1032 Orchard St., Toledo, Ohio 43609), prezidanto de la loka klubo en Toledo, ŝajnas esti pli konata en eksterlando ol en Usono. Li longtempe korespondadis kun eksterlandanoj, kaj trovis sian nomon en pluraj Esperantaj Gazetoj. Li donis la intereson ankaŭ al aliaj, kaj li kunigis aron da nomoj de personoj, kiuj serĉas korespondantojn. Kelkaj nomoj de la listo kiun li sendis al ELNA-Bulteno troviĝas en ĉi tiu numero, kaj aliaj aperos poste. Vi donos plezuron al S-ro Lareau, se vi fariĝos korespondanto.

LA MOVADO ANKAŭ PROFITIĜOS PER REGALIĜO

S-ro J.L. Mahe elspezis grandan monsumon por krei la filmon "Angoroj." Ni povas helpi lin reakiri la koston, kaj ni samtempe ĝuos elstaran sperton, se ni uzus tiun filmon, por montri al interesuloj. Skribu al S-ro Lewis Cook, Jr., Box 422, Circleville, Ohio 43113.

ELNA-BULTENO

KUNFONDINTOJ
Donald Munro +
Rodney Ring

ADRESO
ELNA-Bulteno
Muhlenberg College
Allentown, Pa. 18104

LA SEPA KONTINENTO: INFANINSULO

Apud Ŝibeniko (Jugoslavio) oni fondas novan infanan respublikon titolatan "La Sepa Kontinento." Tie Infanoj el multaj nacioj kunloĝos kaj kunvivos, akcelante amon inter ĉiuj popoloj. Oni jam faris propagandon tra la mondo, kaj pluraj eminentuloj jam promesis sian helpon - inter aliaj usonanoj. Por pli da informoj, skribu al S-ro Guberina Velimir, Str. Borisa Kidriĉa 69B, Ŝibeniko, Jugoslavio (Jugoslavia).

HELPO POR ITALAJ SAMIDEANOJ

Por la sukceso de la movado en Italujo, precipe en la Trenta regiono, (kie la Esperantistoj, pere de la "Provinca Turisma Entrepreno," publikigis turisman faldfolion - sekve de certigo de ĝia efektiva disvastiĝo en la mondo) estas tre grava, ke la Provinca Turisma Entrepreno de Trento ricevu multajn demandojn pri tiu prospekto, el pluraj mondpartoj. Skribu, kaj oni senpage sendos al vi ekzempleron: ENTE Provinciale Turismo, 38100 Trento, Italujo.

ELNA-PREZIDANTO FARIĜIS INSTRUISTO

Nova klaso por komencantoj komencis la 15an de septembro, 1971, en la distriĝa centro de La Jolla, Ca., kaj la instruisto estas Frank Helmuth. La klaso daŭros ĝis la 15a de decembro.

GEJUNULOJ LERNAS LA LINGVON EN OHIO

Dum la pasintaj du jaroj, en Circleville, Ohio, oni komencis kvar klasojn de Esperanto. S-ro Lewis Cook penas allogi la junularon, kaj li nun, ekde la 13a de septembro, instruas novan grupon.

USONANOJ PARTOPRENIS LA UNIVERSALAN KONGRESON EN LONDONO

Laŭ nia informo, 48 personoj de Usono enlistiĝis por la ĉijara UK en Londono. Ili venis el 12 Ŝtatoj kaj la Distrikto de Columbia, kaj la plej grandaj grupoj reprezentis Californion, Novjorkon, kaj Pensilvanion.

ĈU VI VIDIS ĈI TIUN (PERDITAN) PERSONON?

Lă onklo, Hadjiev, serĉas Konstantin Petrov Tabakov, Esperantisto bulgara origina, loĝanta en Usono (ĝis 1968 en Novjorko, poste eble Chicago). Li estas granda blondulo 45-jaraĝa. Informu aŭ ELNA-Bulteno aŭ skribu rekte al SAT, 67 Ave. Gambetta, Paris, Francujo (France).

NI KORESPONDU

Novzelanda 47-jara farmisto-edzino volas interŝanĝi leterojn, bildkartojn, kaj poŝtmarkojn. S-ino Jill Fraser, Houto Rd., Titoki, Northland, New Zealand.

Japana elektro-teknikisto, kiu havas 29 jarojn, kaj ŝatas belarton, librojn, Espo-movadon, kaj montogrimpadon, deziras korespondantojn. S-ro Masamitsu Takada, 1-2764 Hagiyaama, Kigashimurayama, Tokyo 189, Japanio (Japan).

Hispana korespondemulo volas havi amikojn en Usono. S-ro Luciano Barcelo, Str. Bov de San Pedro 8-4-3, Barcelona 3, Hispanujo (Spain).

Rusa 25-jara jur-studento, kiu interesiĝas en internaciaferoj, pacmovado, kaj la junulara vivo, serĉas korespondantojn. S-ro J. Prizerovski, U.Ĉernigov-Poŝtamt do Vostrebovanija (Poŝtreŝtante), Sovietunio/USSR (Soviet Union).

ELNA-korespond-direktorino deziras pruntepreni ekzempleron de "En Okcidento Nenio Nova." Se iu havas ĝin, kaj pruntedonos, ŝi promesas, ke ŝi resendos ĝin al vi. Ellen Lewis, 15 Salisbury Rd., Brookline, Mass. 02146.

Scivolema brazila fraŭlo deziras korespondi kun dekjarul(in)oj (angle:"teens"). Li volas interŝanĝi fotojn, bildkartojn, revuojn, aŭ ĵurnalajn elĉerpaĵojn pri ĉiuj temoj. Jose da Silva, Caixa Postal D-19, 88.800-Criciuma-SC, Brazilo.

Aro de korespondemuloj en Estona SSR esperas interŝanĝi poŝtmarkojn, gazetojn, librojn, ktp.; sed ne forgesu, ke, pro la ĉeĥa afrank- kaj poŝt-problemoj, oni ne atendus baldaŭan respondon: S-ino Erna Rosson, Gagarin-Souĥovo, Liiva, Estonio SSR, USSR; S-ino Ilse Henrichson, Str. Kmarise 4-5, Viljandi, Estonio SSR, USSR; F-ino Ene Kĥu, Str. Silla 8, Vĥhma, Estonio SSR, USSR; S-ino Laine Kalvik, Str. Valuoja 17-22, Viljandi, Estonio SSR, USSR; S-ino Ida Kangur, Holstre Kool, Estonio SSR, USSR; S-ino Erika Kajandi, Kingiseppa 33-2, Viljandi, Estonio SSR, USSR; F-ino Pille Pärtura Meeme 17-1, Viljandi, Estonio SSR, USSR; S-ro Ants Mikk, Jakobsoni 3-2, Viljandi, Estonio SSR, USSR (Soviet Union).

24-jara hungara junulo, kiu loĝas kaj laboras en orienta germanujo, kaj, kiu lernis la lingvon en 1966, interesas en fotografio, lingvoj, ktp. Li volas korespondi precipe kun usonaj gejunuloj. Gustavo Lukacs, Carl von Ossietzky Str. 204, 3-vu/30, 90 Karl Marx Stadt, DDR Orient-Germanujo (East Germany).

18-jara studanto en mekanika lernejo en supra Silezio, kiu ĵus lernis la internacian lingvon, kaj volas korespondi kun 16-20 jaraĝaj gejunuloj "en eksterlando," interesiĝis precipe en sporto. Eugenio Chaszczowy, Ul. Mickiewicza 15/14, Bytom, Pollando (Poland).

Arkitekto-projektano, kiu estas "malnova amiko de Esperanto," deziregas korespondi kun usonanoj. S-ro Julio Kristof, (Rliget) Liszt F., U.24, Budapeŝt XVII, Hungario (Hungary).

38-jara oficisto deziras usonajn korespondantojn. S-ro Jarda Novák, Padoli 297, Elronov III, okres Náchod, Ĉeĥoslovakio (Czechoslovakia).

Mezaĝa pola virino, kiu interesiĝas en poŝtmarkoj, bildkartoj, "manĝtukoj" faritaj el papero, kaj ankaŭ fotografio, volas korespondi kun gesamideanoj. Fola Wieruneuska, Piotrkow Fryl., Wyzivolenia Bl.25/22, Pollando (Poland).

Dentisto 40-jara, kiu komencas lerni la internacian lingvon, volas ricevi leterojn. D-ro Konrad Antoniewski, Watbrzych 11, Okolna 72, Pollando (Poland).

25-jara kemiistino deziras korespondi pri multaj temoj, ekzemple pri lingvoj, sportoj, kaj Esperanto-movado. F-ino Alena Rousava, Plyna' Renska 41, Kolin IV, Ĉeĥoslovakio (Czechoslovakia).

ARTIKOLOJ

RIP VAN WINKLE

Ĉi tiu estas adaptaĵo de la klasika historieto de Washington Irving, 1868, de Ella Gibson

Dum "Usono" ankoraŭ estis sub la regado de la angla reĝo, Georgo III, estis vilaĝo malsupre de la Montoj Kaatskill, en la Ŝtato Novjorko. Kaj en ĉi tiu vilaĝo loĝis simpla bonkorulo, nomita Rip Van Winkle. La junuloj de la vilaĝo tre amis Rip, ĉar li ilin instruis pri kajtkonstruado, kaj ofte regalis ilin per tremigaj rakontoj pri fantomoj, sorĉistinoj, kaj indianoj. Ankaŭ Rip nepre helpis la najbarojn fari multajn taskojn. Fakte, li ĉiam estis preta fari la laboron de iu ajn, kun escepto de siaj propraj taskoj.

La edzino de Rip senĉese riproĉis lin, ĉar li estas tiel senambicia bonkorulo. Por eskapi ŝian pikan langon, li kaj sia hundo ofte grimpis en la Montoj Kaatskill.

Iun tagon, posttagmeze, Rip estis atingonta la pinton de la pli proksima monto, kaj, iomete laca, li sidiĝis por ripozi. Dum li tie sidis, ĝuante la belan pejzaĝon de la valo kun ĝia serpentuma rivero, subite li aŭdis strangan voĉon, kriantan, "Rip Van Winkle!" La hundo ekgrumblis, kaj la hundhararo hirtiĝis. Rip maldekstren rigardis, kaj vidis, malsupre, strang-

ulon, vestita en antikva Holanda modo, kiu malfacile grimpas supren kun bareleto sur la dorso. Rip rapidiris helpi lin. Kune, ili suprenportis la bareleton laŭlonge de ravineto ĝis kaŝita herbejo, tute ĉirkaŭita de arboj.

En la centro de la herbejo, kelkaj stranguloj, same vestitaj kiel la kunulo de Rip, ludis keglo-ludon. Kiam ajn unu pilko trafis alian, la sono eĥis tra la montoj kiel tondro. Subite la grupo ĉesis, kaj ĉiu ludanto sen-vorte staris kaj fikse rigardis Rip. Dum li timeme ilin returne rigardis, la kunulo eltiris la korkon el la bareleto, kaj elverŝis brunan likvaĵon en tasegojn. Li manpetis al Rip transdoni la plenigitajn tasegojn al la grupo. Tremetante, Rip tion faris, kaj ĉiu ludanto rapide malplenigis sian tasegon kaj rekomencis la ludon.

Poste, sidante sole apud la bareleto, Rip sentimiĝis. Li plenigis tasegon por si mem. Ĝi estis bongustega vino! Li malplenigis la tasegon, kaj poste droniĝis en dormo, malgraŭ la tondro de la ludpilkoj.

Vekante, li sin trovis ĉe la sama loko kie li unue sidis por ripozi. Sed nun la frumatena suno forte brilas. Li ĝemis, "Ĉu mi restis tie ĉi la tutan nokton?" Post unu momento, li memoris la strangulon kaj la bareleton. La vino! La dormiga vino! Ho ve, kion diri al la edzino pri la tranokta for-esto? Li devas rapidi hejmen kaj fari sian senkulpigon.

Rip ekstaris kaj serĉis sian musketon, sed trovis nur tre rustiĝitan pafilon. La hundo ankaŭ malaperis. Rip fajfis laŭte, sed la hundo ne venis. Eble la stranguloj havas kaj la hundon, kaj la pafilon. Li decidis reiri al la kaŝita herbejo. Li serĉis kaj serĉis, sed ne sukcesis trovi ĝin. Finfine, malespere, li iris hejmen.

Kiam li alproksimiĝis al la vilaĝo, li renkontis plurajn vilaĝanojn, sed, strange, eĉ ne unu estis konatulo. Tiu fakto ege mirigis Rip. Kaj, kiam li eniris la vilaĝon, tute nekonataj junuloj sekvis lin kriante, "Rigardu la grizan barbulon!" Rip palpis sian barbon. Ĝi estis mirinde tufa kaj longa. Rip ek-sentis sin ensorĉita. Eble la bruna vino ankoraŭ frenezigas lin en ia inkubo. Eĉ la domoj ŝajnis esti strangaj, kaj, ĉe la fenestroj, vizaĝoj nekonataj lin rigardis scivole.

Kun korporema maltrankvilo, Rip rapidis al sia propra domo. Kia konstern-aĵo! La muroj estis teren falintaj. Nur la kamentubo ankoraŭ staris. Panike Rip rapidis al la vilaĝa gastejo, kie li kutime rendevuis kameradojn. Tie, alia strangaĵo frontis lin. Kie la amata gastejo devus esti, tie nun staras konstruaĵo kun apuda stango, el kiu flirtadas flago kun steloj kaj strioj!

Rip haltis, tro konfuzita por fari unu paŝon plu. Nun vilaĝanoj kolekti-ĝis ĉirkaŭe. Unu gravaspektulo frapetis la brakon de Rip kaj demandis laŭtvoĉe, "Por kio vi venas al ni, maljunulo?" Malforte, Rip respondis, "Mi serĉas kameradojn." Li nomis kelkajn. "Ili ĉiuj nun ripozas en la tombejo," estis la respondo.

Je ĉi tiu novaĵo, Rip kriis panike, "Ĉu ne restas eĉ unu persono kiu konas Rip Van Winkle?"

Tiam virino kun brakinfano diris, "Rip Van Winkle estis mia patro! Iun tagon li malaperis en la montoj. Lia hundo revenis hejmen kaj poste mortis, sed mia patro tute malaperis. Tio okazis antaŭ dudek jaroj."

Rip ploris pro ĝojo, ke sia filino ankoraŭ vivas. "Mi estas via patro," li kriis. "Mi estas Rip Van Winkle. Vi sendube estas Karenjo, nur kvin jaraĝa kiam mi lastfoje vidis vin. Kion pri via patrino?" La filino sciigis lin, ke la patrino mortis antaŭ dek jaroj. Je ĉi tiu novaĵo Rip trankviliĝis, ĉar nun ne necesas fari al ŝi senkulpigon.

Post la brakumo de la filino kaj nepo, Rip rakontis al la grupo la aventurojn en la montoj. Ĉe la fino, li iris hejmen kun sia filino. Ŝi kaj la edzo havas bonan farmo-bienon. Rip estas tre kontenta. Tie ĉi ne estas edzino kun akra lango. Li baldaŭ iĝis fama rakontisto, kaj la plej ŝatata amiko de la junuloj. Kiam ajn estas aŭdata tondro en la Montoj Kaatskill, li ĉiam diras, ke la stranguloj nun kegloludas en la kaŝita herbejo.

Laŭ anonco de la Ekzamena Servo (1010 Crestwood Place, Santa Barbara, Ca. 93105), sukcese trapasis la jenajn ekzamenojn, inter la la de junio, 1969, kaj la la de junio, 1970, la sekvantaj gesinjoroj:

MEZGRADA EKZAMENO:

- S-ro P.S. Taylor, West Covina, Ca.
- William Shanks, Cupertino, Ca.
- *D-ro B.J. Balcar, Monterey, Ca.
- S-ino Doris Vallon, San Mateo, Ca.
- *Patro G.J. Wuest, Chicago, Ill.
- *R.M. Bennett, Tampa, Fla.
- C.J. McKown, State College, Pa.
- S-ro S. Castle, San Francisco, Ca.
- Robert G. Bailey, Redwood City, Ca.
- *S-ino M. Walker, Napa, Ca.

- S-ro Artie Riggle, Sparks, Nev.
- S-ro J. Neumann, San Diego, Ca.
- Robert Williams, Stockton, Ca.
- W. Campbell Nelson, Ontario, Ca.
- *S-ino Gretchen Doris, Tampa, Fla.
- *S-ro Ken Thomson, Pasadena, Texas
- C.W. Duffield, St. Petersburg, Fla.
- S-ino M. Rees, Hillsborough, Ca.
- S-ro J. Berry, San Francisco, Ca.

KOMENCGRADA EKZAMENO:

- F-ino M. Bryce, San Francisco, Ca.
- S-ino M. Alverson, " " "
- *S-ino Judith Fike, Covina, Ca.
- S-ino J. Falicki, " " "
- S-ro A. Mendoza, Huntington Park, Ca.
- S-ino B. Wallace, San Rafael, Ca.
- +F-ino Julie Holcomb, San Mateo, Ca.
- *D-ino M. Hornbeck, Los Angeles, Ca.
- F-ino M. Bigelow, Fresno, Ca.
- F-ino P. Morrell, Bloomington, Ind.
- *S-ino Nancy Wolter, Sacramento, Ca.
- S-ro Royal Towns, Oakland, Ca.
- *F-ino R. Costo, Monagas, Venezuela
- S-ino A.E. MacMorris, San Francisco, Ca.
- S-ino LaVerne Galli, " " "
- S-ro A. Acosta, Baldwin Park, Ca.
- F-ino Asela Acosta, " " "
- S-ro B. Gronich, Van Nuys, Ca.
- +*S-ro B. Landon, Great Neck, N.Y.
- +*F-ino G. Sharwood, Oakland, Ca.

- F-ino E.S. McGarran, Springfield, N.J.
- *S-ro H. Montgomery, Wayne, Pa.
- *Patro D.R. Bateman, Chicago, Ill.
- S-ino Eva Buski, Burnaby, B.C.
- S-ino E.N. Howie, S. Burnaby, B.C.
- S-ino Sophie Smith, Vancouver, B.C.
- *S-ino E. Stone, Worthington, Ohio
- *S-ro John Weed, Columbus, Ohio
- S-ro Leroy Edwards, San Diego, Ca.
- *S-ro Gerald Carlton, Sacramento, Ca.
- S-ino J. Brugos, Sausalito, Ca.
- S-ro A. Wickham, San Francisco, Ca.
- S-ro F. Lanzone, Jr., San Carlos, Ca.
- F-ino P. Oyler, W. Fairview, Pa.
- F-ino N. Hackenber, Thompsettown, Pa.
- F-ino L. Chambers, Elizabethtown, Pa.
- S-ro R. Napoletano, Upper Darby, Pa.
- F-ino V. Huntsinger, Elizabethtown, Pa.
- S-ro W. Mota, San Francisco, Ca.
- S-ro Ronald Ivins, " " "
- S-ro E. Hammock, Columbus, Ohio

(LA DAŬRIGO DE ĈI TIU LISTO SIN TROVAS FINPAĜE.)

BONVOLU ELTRANĈI LA SUBAN PARTON KAJ SENDI ĜIN, KUN MONO, AL LA KASISTINO:

Peggy Linker, 1414 Monroe St., Walla Walla, Wa. 99362

197
ELNA

Mi enmetas la kotizon kiel subindikita. Mia nomo kaj adreso ĝuste aperas sur la alia flanko (dorsflanke).

KONTRIBUANTA MEMBRECO

- ___ KONSTANTA (\$8.00)
- ___ EDZIĜPARA (\$12.00)
- ___ SUBTENA (\$15.00)
- ___ PATRONA (\$25.00)
- ___ DUMVIVA (\$160.00)
- ___ KUNDONACO (\$.....)

Mi elektas la jenan (senpagan) gazeton:
 ___ HOMO KAJ KOSMO
 ___ NORDA PRISMO
 ___ HEROLDO (nur por novaj abonantoj)

___ STUDANTO (\$3.00), malpli ol 30 jaraĝa

NASKIĜJARO _____

___ EKSIĜULO (\$4.00), pli ol 62 jaraĝa post kvinjarabono

___ NOVA ABONO _____

ABONRENOVITGO

 O F I C I A L A E L N A - A D R E S A R O

PREZIDANTO

Francis E. Helmuth
5526 Beaumont Ave.
La Jolla, Cal.
92037

VICPREZIDANTO

Mark Starr
3940-47th St.
Long Island City
New York, 11104

SEKRETARIO

Robert E. Bailey
147 Birch Street
Redwood City, Ca.
94026

KASISTINO

Peggy Linker
1414 Monroe St.
Walla Walla, Wash.
99362

KORESPOND-DIREKTORINO

Ellen A. Lewis
15 Salisbury Rd.
Brookline, Mass.
02146

UEA-ĈEFDELEGITO

Armin Doneis
P.O. Box 105
Pharr, Texas
78577

INFORMCENTRO

OKCIDENTA
410 Darrell Road
Hillsborough, Cal.
94010

ARKIVISTO

D-ro B. J. Balcar
62 Via Castanada
Monterey, Ca.
93940

INFORMCENTRO

NOVJORKA
156-5th Ave. Rm. 821
New York, N. Y.
10010

+*S-ro Gary Mickle, Davis, Ca.
*F-ino M. Hagler, Denver, Col.
*S-ino H. Heusser, Portland, Ore.
*S-ro B. Johnson, Berkeley, Ca.
Daniel Sommerfeldt, Fond du Lac, Wis.
S-ino Erna Sheppard, Nanaino, B.C.
S-ino G. Dillon, S. Brooksville, Me.
S-ro Wayne Dillon, " "
F-ino M. Sharp, Cherry Hills, N.J.
F-ino J.A. Johns, Elizabethtown, Pa.
F-ino Sharon Hornick, " "
F-ino Joy Rosengarten, " "
*S-ro C.H. Dennis, Jr., San Francisco, Ca.
S-ro William Mota, " " "
*S-ino C. Congdon, Napa, Ca.
+*Bryan H. Jones, Austin, Texas
Fratino Rose Doyle, Davenport, Iowa

*S-ro W. Deary, Crystal Beach, Fla.
D-ino G. Novak, Chicago, Ill.
*C.W. Duffield, St. Petersburg, Fla.
*F-ino Dorothy Hughlett, " "
*S-ro P. Ullman, Milwaukee, Wis.
*S-ro Barry Adam, Delta, B.C.
S-ino K. McBurnie, Burnaby, B.C.
*S-ro Lewis Cook, Circleville, Ohio
S-ino J. Perkinson, Columbus, Ohio
S-ino H. Hammock, " "
D-ino H. Gunter, Walnut Creek, Ca.
S-ro E. Fratini, Petaluma, Ca.
S-ino E. Wells, Napa, Ca.
S-ro W. Gruneisen, Sacramento, Ca.
F-ino Takako Negi, San Francisco, Ca.
S-ro Kent Jones, Chicago, Ill.
*= kun honoro; += malpli ol 18jaraj

Ni gratulas ĉiujn, kaj ni estonte publikigos novan liston de tra-pasintuloj.



ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA

156 FIFTH AVENUE, NEW YORK, N.Y. 10010

NON-PROFIT ORG.
U. S. POSTAGE

Paid

Kutztown, Pa.
Permit No. 8

RETURN POSTAGE GUARANTEED
ADDRESS CORRECTION REQUESTED